

Ora Ĵurnalo

ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGEBLAS ĈIUTAGE

Numero 62, Majo 2023



Stora Hamnkanalen.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo	2	Rödspov på Öland – Nigravosta limozo sur Oelando – <i>Renate Säfström</i>	14
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	La jarraporto de Amnestio Internacia: Grava kritiko al Maroko – Amnestys årsrapport: Hård kritik mot Marocko – <i>Lena Thunberg</i>	15
Espeporko meditas.....	3	Kion oni rete diras pri Esperanto? – <i>Inga Johansson</i>	16
La migrobirdoj	3	Nobelstipendium beslagtogs hos Pettson och Findus ryska översättare – <i>Kalle Kniivilä</i>	17
En aprilo.....	4	Mediterranea Esperanto-Semajno 2023.....	20
Ole Therkelsen, Danio, sendis memorvortojn pri Lars Forsman	5	Prova en Esperanto-kurs 19–22 juni i Equmeniakyrkan	22
Ĉu la unua Esperanta teatraĵo nacilingviga? – <i>Raita Pyhälä</i>	7	Nova lernolibro, eldonita de Folke Wedlin, Mölndal	22
Teatro Lorensberg – Lorensbergsteatern – <i>Ingegerd Granat</i>	8	Fiksbildoj el "Veckan" de 1904.....	23
Raporto de la Urba deputitaro – <i>Jesper Berglund</i>	10		
Krönika – Om klimatet – <i>Richard Nordin</i>	11		
En kiuj okupoj en Svedio oni trovas pli da virinoj, en kiuj pli da viroj? – I vilka yrken i Sverige finns fler kvinnor och i vilka fler män? – <i>Roger Nilsson</i>	12		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.

La venonta numero estos duobla numero kaj aperos en julio.

Okaze de la 400-jara jubileo

de Gotenburgo, Ingegerd Granat skribas artikolojn pri la urbo. Ekde 2021, kiam estis la vera jubilejaro, ĝis nun en 2023, kiam la celebros okazas, ŝi jam skribis 44 artikolojn pri Gotenburgo! En ĉi tiu numero troviĝas la artikolo **Teatro Lorensberg** – agrablan legadon!





Espeporko meditas



- ◆ Unue mi volus **korekti la vivdatojn de Pär Lagerkvist** en la aprila numero. Li vivis 1891–1974. Roger Nilsson atentigis nin pri la eraro. La datoj en la aprila numero estas tiuj de lia patrino. Dankon Roger!
- ◆ **Valpurgan antaŭvesperon** mi iris al la sinjorlando Nääs, pli konata pro siaj somermezfestoj. Tamen la invado de homoj aspektis same intensa. Aŭtoj plenigis kaj la parkejojn kaj la gazonojn ekde la vojo E 20 ĝis la sinjorlando. Pro la amaso da homoj ni ne vidis la festofajron, nur ĝia fumo. Do, pliaj festlokoj estas bezonataj por la gotenburanoj.
- ◆ Grava informo sur la antaŭlasta paĝo – **la somerkurso en Gråbo** okazas ĉirkaŭ 30 km de la centro de Gotenburgo, sed nur 3 km de la urba limo. Kial papavo kaj ne artemizio kiel ilustraĵo en la kursanonco? La herbo artemizio ja signifas svede Gråbo. Ni elektis la papavon pro ties alloga koloro. Kial la kurso ne estos en Gotenburgo? Nu, ĉar la

kutimaj lokaloj de Vuxenskolan estos bezonataj por rifuĝintoj el Ukrainio, kiuj eklernos la svedan.

- ◆ **Teatro kaj teatraĵo** – necesaj aferoj en tempo de malgajaj novaĵoj. Legu!
- ◆ Venis **memorvortoj pri Lars Forsman de Danio**, malfruaj por la aprila numero, sed entempe por la maja.
- ◆ **Okcidenta Saharo** ŝajnas forlasita de la tuta mondo. Kiu povus liberigi la landon?
- ◆ Por mi, kiu vivas ekster Gotenburgo, gravas scii pri kio oni decidas en la komunuma deputitaro de Gotenburgo, ĉar Gotenburgo estas ja mia plej proksima urbo. Mi bonvenigas la novan serion de **raportoj de la gotenburiga deputitaro** faritaj de Jesper Berglund.
- ◆ **Fine...** Penso pri kies origina fonto mi ne scias – sed Vida el Litovio sendis ĝin:

*Ne prokrastu ĝis la perfekta momento!
Uzu la nunan kaj igu ĝin perfekta!*

/ Siv



*Vi gasto veninta al strand'
fluginta el fora la land',
ankor' anemonoj ne floras
patrujon vi tamen memoras,
kie fluas rivero
ĉe alno, herbero.
La flugilojn vi levas
ĉar returni vi devas.
La vojon montras neniuj,
al Nordo la kara reiru,
barante la ventoj blovas
la vojon vi tamen trovas.*



La migrobirdoj
J. L. Runeberg (libera traduko)

En aprilo

1) Salutojn de Lucyna, Pollando!



Mevo sur la fenestrolado kaj arte dekoritaj ovoj

2) Salutojn de la lago Hornborgasjön, Svedio.

Foto pri grupoj farita de spertulo (bildkarto) kaj foto farita de mi.



Ĝis la Paska Dimanĉo "nur" 8300 grupoj estis venintaj al Hornborgasjön. Kiom da homoj kiuj estis tie por spekti ilin ne estis nombrita, sed estis multaj.

Mi pretendis uzi la grandan lornon de Jan, sed fakte mi pli bone vidis la grupojn sen

lorno. Ili estas ja grandaj. Bedaŭrinde ne multaj dancis.

Troviĝis ne nur grupoj. En aliaj partoj de la lago abundis ĉiuj specoj de akvobirdoj.

/Siv



Ole Therkelsen, Danio, sendis memorvortojn pri Lars Forsman



Ole laboris por Esperanto kaj por la Kosmologio de Martinus. Li prelegis en multaj landoj. Sur la supra foto de 1988, li estas en Ĉinio. La kontribuo de Ole venis tro malfrue por la aprila numero de Ora Ĵurnalo sed entempe por la maja.

Jen mia teksto kun kelkaj alkroĉitaj fotoĵoj de Lars Forsman en Karlskoga.

Plurfoje mi partoprenis en la eo-Kursoj en Karlskoga Folkhögskola dum la jaroj 1991–1998.

Kelkfoje mi invitis Lars Forsman al Martinus Centro en Klint, Klintvej 69, DK-4500 Nykøbing. Li instruis la internacian lingvon kaj rakontis pri siaj eo-kursoj en Karlskoga.

Ekde 1989 ĝis la fino, ĉirkaŭ 60 Martinus-interesuloj el Skandinavio partoprenis en la esperanto-kursoj de Lars Forsman. Kelkfoje Lars diris al mi: "Vi savis miajn kursojn" pro tiu granda partopreno de la Martinus-interesuloj.

Lars Forsman estis tre afabla kaj ĝentila homo, kiu bonkore, energie, inspire kaj instige instruis Esperanton. Mi lernis la internacian lingvon, sed mi ankaŭ lernis pri la interesa historio de la vivo de Zamenhof kaj de la esperanta movado.

Poste mi ofte partoprenis en la Universalaj Kongresoj, i.a. en Prago 1996, Berlino 1999, Gotenburgo 2003, Vilno 2005 kaj en Kopenhago en 2011, kie mi eĉ estis membro de la LKK = Loka Kongreso Komitato.

Mi esperante prelegis pri la dana filozofo Martinus (1890–1981) en pluraj landoj: Rusio, Francio Aŭstrio, Ĉeĥio, Ĉinio, Japanio, Nov-Zelando, Aŭstralio kaj Usono.

Mi daŭre estas redaktoro de Eo-Kosmos, Revuo de Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, 2000 Kopenhago.

Dufoje jare mi dissendas la revuon, kiun oni senpage povas aboni skribinte al mi,

Ole Therkelsen, je la adreso
esperanto@martinus.dk

Mi konsideras min mem kiel frukto de la laboro de Lars Forsman. Mi kore dankas al li.

Amike *Ole Therkelsen*



Lars Forsman en la Popolaltlernejo de Karlskoga, kie li dum 15 jaroj instruis gelernantojn el diversaj landoj.



Meze en la grupo: Andras Forman, Pollando kaj Lars Forsman.

*En la Popolaltlernejo en nov–dec 1997.
Maldekstre de Lars: Sven kaj Helen de Kopenhago.
Dekstre de Lars: Ole Therkelsen.*





En 1991 – dekstre: Lars kaj Ole.

En 2003. La inaŭguro de la UK en Gotenburgo. Lars havis la rolon prezenti Svedion dum Nacia Vespero.

Se vi volus Kosmos-on (La Kosmologio de Martinus) rete en Esperanto, dufoje jare, vi povas skribi al Ole Therkelsen: esperanto@martinus.dk /Siv



Ĉu la unua Esperanta teatraĵo nacilingvigita?

de Raita Pyhälä

Akademiano Tatjana Auderskaja tradukis la teatraĵon *Rigardu antaŭ ol salti* de la brita-sveda Esperanta verkisto *Harold Brown* (1925–2004).

En marto 2023 la teatraĵo estis plurfoje prezentita en la teatro Peruckij en Odessa. Dum la Internacia tago de teatro 27.3.2023 ĝi tie ricevis la premion Honora Folio. En la dramo temas pri viro, kiu konsideras sian vivon sensukcesa kaj sin mem sentaŭgulo. Kvankam li firme decidiĝis mortigi sin, ripete okazas absurdaj kaj komikaj intervenoj, kiuj ridige malsukcesigas la seriozan decidon.



Harold Brown.



Tatjana kun la premio Honora Folio.

La dramojn de Harold Brown en Esperanto siatempe prezentis – sed nur en Esperanto – la profesia pola aktoro *Jerzy Fornal*, la plej talenta mimo en Esperantujo, sed nur en Esperanto. Plurajn monologojn aŭ dramojn kun malmultaj roluloj H. Brown kreis ĝuste por li. Jerzy Fornal turneis tra Svedio prezentante ilin.

La dramo *Rigardu antaŭ ol salti* estis prezentita en Esperanto ankaŭ en la Londona Esperanto-klubo lige kun la Jubileo de la Centjariĝo de Esperanto-teatro.



Du jarojn post la morto de H. Brown ok liaj dramoj kaj du tradukoj aperis en la kolekto nomita ***Eduko danĝera kaj aliaj teatraĵoj*** kun ***Eseo de Zofia Banet-Fornalowa***.

Citaĵo el ŝia eseo:

”Harold Brown apartenas al intelekta kaj kultura elito de Esperanto-komunumo.”

Estas ja ĝojige, ke unu el liaj Esperantaj teatraĵoj nun aperis ankaŭ nacilingve kaj meritis premion.

Raita Pyhälä

Teatro Lorensberg – Lorensbergsteatern

de/av Ingegerd Granat




Ĉe la supro de la avenuo Avenyn en Gotenburgo, iom malantaŭ la vere elegantaj establaĵoj, troviĝas ŝi, la muzo de la komedio, posteulino de Thalia, nome la teatro ”Lorensbergsteatern”. Memoraĵo el antikvaj tagoj, ĉirkaŭ la antaŭa centjarŝanĝo. Vidu kiel la masko asociita kun la muzo Thalia petole ridetas.

Hodiaŭ, la teatro estas memoriga monumento kun turniĝanta scenejo kaj fiksa luma horizonto. La teatrosalono

mem estas Längst upp på Avenyn i Göteborg, lite bakom de riktigt fina etablissemangen, ligger hon, kommedins musa, Thalias ättling, nämligen Lorensbergsteatern. Ett minne från fornstora dagar, runt förra sekelskiftet. Se hur den med musan Thalia förknippade masken ler skälmskt.

Idag är teatern ett byggnadsminne med en vridscen och en fast ljushorisont. Själva teatersalongen är en av stadens få bevarade salonger från 1920-talet.



unu el la malmultaj konservitaj salonoj en la grandurbo el la 1920-aj jaroj. Ĉi tio donas bonegan ŝancon por vera aktorado kaj bonegan sperton por la spektantaro. Tion pruvis en la lastaj jaroj la scenejprezentado "Kulturtuben", kun ĉiuj humuraj kaj pensigaj teatraĵoj de la esembla "Galenskaparna".

"Glada Hudik" ankaŭ havas historion ĉe Lorensbergsteatern. Glada Hudik kun sia fantazia ensemblo, ĉiukaze al mi faris daŭran impreson. La aktoroj estas tute ordinaraĵoj sed kun ia funkcia variaĵo, sed montriĝis fantazia teatraĵo en unika medio.

Ĉe la turniĝo de la 19a al la 20a jarcento, oni ludis tie keglon kaj alkoholaĵo estis trinkata. Markistoj ĉe la keglejoj estis knaboj de la proksimaj lernejoj kaj la knaboj gajnis sumetojn per ĝojkrii pri

la mediokraj klopodoj de la ebriaj grocistoj kaj de la "kremo de la kremo" ĝenerale. Je la deka kaj duono la hazardludo kaj drinkado finiĝis kaj la kegloknaboj, revenantaj hejmen, certe faris unu aŭ du bubajojn, laŭ onidiro.

Tio okazis dum la tempo, kiam estis lanternistoj kaj noktaj gardistoj en Gotenburgo kaj la familio Nonnen loĝis en la areo de Liseberg.*

Frans Cabré, la muzikdirektoro en la Regimento de la Göta-artilerio, konstruis la unuan teatrokonstruaĵon en 1842.

Ĝi situis en la areo "Landeriet No 90 Lorensberg en la 12-a paro" kaj forbrulis la 1an de decembro 1864. Robert J Graf aĉetis la areon en 1866 kaj konstruigis novan teatron. Ĝi estis inaŭgurita la 31an de majo 1868.

Detta ger stor möjlighet till ett sant skådespeleri och en stor upplevelse för publiken. Detta har under senare år "Kulturtuben", med Galenskaparnas alla humoristiska och tankeväckande pjäser bevisat. "Glada Hudik" har också en historia på Lorensbergsteatern.

"Glada Hudik" med sin fantastiska ensemble, har i alla fall gjort ett bestående intryck på mig. Skådespelarna är alldeles vanliga människor men med en funktionsvariation av något slag men det blev en fantastisk teater i en unik miljö.

Vid tiden för sekelskiftet 18–1900-talet spelades det kägelspel och dracks sprit. Markörer vid kägelbanorna var pojkar från skolorna i närheten som tjänade en hacka på att jubla över mediokra insatser av beskänkta grosshandlare och "creme de la creme" i

övrigt. Vid halv elva-tiden var spelandet och supandet slut och hemvändande kägelpojkar gjorde nog ett och annat busstreck på hemvägen, låter ryktet berätta.

Detta hände under den tid när det fanns lykttändare och nattvakter i Göteborg och familjen Nonnen bodde på Liseberg.*

Det var Frans Cabré, musikdirektören i Göta artilleriregemente, som lät bygga den första teaterbyggnaden år 1842.

Den låg i området "Landeriet No 90 Lorensberg i 12:e roten" och brann ner den 1:e december 1864. Robert J Graf, köpte området 1866 och lät bygga en ny teater. Denna invigdes den 31 maj 1868.

Till slut, och efter många turer, fungerar Lorensbergsteatern som teater och den 27:e oktober 1916 invigdes nuvarande byggnad.



Galenskaparna.

Fine, kaj post multaj rondiroj, la Teatro Lorensberg ekfunkciis kiel teatro kaj la 27-an de oktobro 1916, la nuna konstruaĵo estis inaŭgurita.

Wilhelm Stenhammar skribis muzikon de grandaj proporcioj kaj mem direktis la orkestran asocion de Gotenburgo.

– Tiam mi ŝatus esti partoprenanta kaj ankaŭ frapas min, ke estas tiel facile forgesi la verajn kulturajn trezorojn, kiuj troviĝas en Gotenburgo.

Se vi havos la ŝancon, iru al prezentado ĉe la Teatro Lorensberg.

Sentu la densigitan atmosferon. Spertu la misteron. Aŭskultu la sonojn, kiuj kreiĝas ekster la replikoj sur la scenejo kaj antaŭ ĉio, spertu la senton de atendo ... / Ingegerd

*) Legu pri la familio Nonnen en Ora Ĵurnalo n-ro 14.

Wilhelm Stenhammar hade skribit musik av stora mått och dirigerade själv Göteborgs orkesterförening.

– Då hade jag velat vara med och det slår mig också att det är så lätt att glömma bort de riktiga kulturskatterna som finns i Göteborg.

Kommer möjligheten, så gå på en föreställning på Lorensbergsteatern.

Känn den förtätade stämningen. Upplev mystiken. Hör på ljuden som uppstår utanför replikerna på scenen och framför allt, känn en förväntan ... / Ingegerd

*) Läs om familjen Nonnen i Ora Ĵurnalo nr 14.

Detta är ännu en artikel i serien om staden i anledning av Göteborgs 400-årsjubileum.

Raporto de la Urba deputitaro 2023-04-27

de Jesper Berglund



Estas la dua raporto de la loka parlamenta asembleo en Ora Ĵurnalo. Por priskribo de la menciitaj partioj, vi povas legi numeron 61 el aprilo.

La plena deputitaro kunvenas unufoje ĉiun monaton.

La grandaj demandoj ĉi-monate koncernis ĉefe du aferojn, nome la demando de konvertiĝo de komunumaj apartamentoj,

kiujn la loĝanto luas, en posedatajn kaj la demando pri kiel la urbo organizu laboron ĉirkaŭ "ĉiutagaj aktivaĵoj".

Krom multaj aliaj raportoj, la revizio de la revizoroj de la grandurbo por 2022 kaj kelkaj negravaj aferoj estis traktataj.

La urbo posedas multajn apartamentojn en loĝdomoj konstruitaj por la komuna bono, apartamentoj por kiuj la loĝanto lupagas. La dekstraj partioj volas, ke tiuj, kiuj loĝas en tiaj apartamentoj, povu aĉeti ilin de la komunumo kaj tiel transformi la luatajn apartamentojn en posedatajn kaj kiujn la loĝantoj povas laŭvole vendi. (La domo, en kiu tia apartamento situas, estas tamen posedata de asocio, en kiu la loĝanto devas esti membro kaj al kiu pagas kotizon.)

La dekstraj partioj opinias, ke tio kondukus al pli da libereco de elekto por la loĝantoj kaj

pliigas liberecon en la urbo. La maldekstraj partioj opinias, ke tio malpliigus liberecon en la urbo, ĉar tiuj apartamentoj tiam malaperos el la komuna atendvico por loĝejo kaj signifas ke nur tiuj, kiuj povas ricevi prunton, aŭ estas riĉaj, povos ekloĝi en tiuj loĝejoj. Post debato de pli ol 1,5 horoj, la deputitaro decidis, post kiam la Centra partio detenis sian voĉon, ne permesi la koncernajn ŝanĝojn.

La alia granda demando ĉe la kunveno, kiu tamen ne postulis tiom da tempo por trakti, estis kiel oni devas organizi ĉiutagajn aktivaĵojn. Ĉiutagaj aktivaĵoj estas agadoj por homoj kun intelektaj handikapo, en kiuj ili havas signifoplenan tagon kaj ankaŭ gajnas –malgrandan– monsumon.

Dum la lasta oficperiodo, kiam la dekstraj partioj regis la urbon, oni enkondukis sistemon, kie iu ajn povas establi ĉiutagan aktivaĵon, kaj se ili plenumas la postulojn fiksitajn, la uzantoj povis elekti sian aktivaĵon kaj la urbo devis financi ĝin. La maldekstraj partioj opinias, ke tio estas malbona sistemo kaj volas aboli ĝin favore al sistemo, kie oni akiras lokojn, por ke la urbo havu pli da kontrolo kaj pli bonan komprenon pri kiel la mono estas uzata.

Estis konstatite en la buĝeto de la maldekstraj partioj, kiu estis ankaŭ adoptita de la depititaro, ke la nuna sistemo estu abolita. Tamen, la maldekstraj partioj ne havas plimulton kaj la aliaj partioj antaŭenpuŝis ke la nuna sistemo, kiun la dekstraj partioj enkondukis, restu.

Alia demando, kiu povas interesi niajn legantojn, estas tiu de renovigo de la kanalmuroj. Goteburgo estas urbo, kiu havas kanalojn tra la urbo. Ili estas malnovaj kaj riskas rompiĝi, kio signifus, ke vojoj, kie la tramoj iras, povus fali en la kanalon. Oni taksas, ke la laboro kostus proksimume 5 miliardojn da kronoj, proksimume 500 milionojn da eŭroj aŭ dolaroj. La tuta depititaro faris strategian decidon pri kiel la laboro devas esti farita.

Oni taksas, ke la laboro daŭros 20 jarojn, sed la muroj povas stari ankoraŭ 120 jarojn. La dekstraj partioj volis pliesplori sed la maldekstraj partioj, kune kun la Centra partio, decidis adopti la direkton.

Jesper Berglund

jesper@jesperberglund.se

Krönika – Om klimatet

av Richard Nordin

När Klimatpolitiska rådet sågar den svenska regeringens klimatpolitik och när varningsklockorna ringer så jag blir alldeles yr i skallen, brukar jag ändå ta ett djupt andetag och tänka att det finns många saker som också går åt rätt håll.

När jag började jobba med klimatpolitik för snart 10 år sedan så var näringslivet en



bromskloss. Politiken sågs som något som skapade problem och kostnader. Man ville fortsätta så som man alltid gjort.

Idag är det helt tvärt om. Även om synsättet är precis

detsamma. Politiken är problemet, men helt omvänt. Företagen har insett att hållbarhet är en del av affärsmodellen. Kunderna vill köra grönt, hållbart och förnybart.

Världsmarknaden för hållbara produkter exploderar och när världen ställer om vill svenska företag vara de som säljer produkterna och tjänsterna. Att ha ledarskap i klimatfrågan ha gått från en börda till en möjlighet.

Tyvärr har politiken inte hängt med.

Näringslivet säger fortfarande att politiken skapar problem och kostnader, men nu handlar det om att regler bromsar utvecklingen. Det går inte att få fram tillräckligt mycket förnybar vindkraft och solet tillräckligt fort. När batterifabriker ska byggas är det miljötillstånden som sätter gränser för hur snabbt det kan gå. Det är för mig som grön politiker både frustrerande och glädjande. Det är frustrerande eftersom jag har så många idéer på förbättringar som jag just nu, med det nuvarande styret inte kan få genomföra, men det är glädjande för att politiken är betydligt lättare att ändra än det internationella finansiella systemet.

Det finns dessutom många andra fördelar med mer förnybart istället för fossilt. Inte

minst att vi slipper köpa från skurkstater som Ryssland, Saudiarabien och Qatar. Länder vi ju inte alls vill gynna med våra pengar. Istället kan förnybara drivmedel från svenska råvaror skapa försörjningstrygghet och tiotusentals arbetstillfällen, det är verkligen en utveckling att bejaka.

När det finns havsbaserad vindkraft som motsvarar hälften av Sveriges nuvarande elproduktion som bara väntar på tillstånd att investera över 400 miljarder och när allt ifrån västkustens kemikluster till Norrlands stålindustri tävlar i om vem som kan ställa om först är det verkligen något att glädjas åt. Den gröna omställningen kommer, nu handlar det bara om ifall Sverige ska kunna skörda frukterna eller inte. Det är en helt ny spelplan att kämpa på och en attraktiv utmaning att ta sig an!

Rickard Nordin, C

Riksdagsledamot för Göteborg
Klimat- och Energipolitisk talesperson

En kiuj okupoj en Svedio oni trovas pli da virinoj, en kiuj pli da viroj? I vilka yrken i Sverige finns fler kvinnor och i vilka fler män?

de/av Roger Nilsson

La ine plej dominataj profesioj

1. Akuŝistino 99,7%
2. Dentoflegistino 98,5%
3. Lerneja flegistino 98,3%
4. Medicina sekretario 97,4%
5. Prizorga administranto 97,4%
6. Pediatria flegistino 97,3%
7. Distrikta flegistino 97,1%
8. Haŭta terapiisto 95,9%
9. Denta higienisto 95,7%
10. Antaŭlerneja instruisto 95,7%

Preskaŭ ĉiuj virinaj profesioj rilatas al zorgado. La unua virina profesio en la listo, kiu havas neniun komunan kun prizorgado aŭ edukado, estas asisto-taksanto (90,5% virinoj kaj en 23:a



Mest kvinnodominerade yrken

1. Barnmorska 99,7%
2. Tandsköterska 98,5%
3. Skolsköterska 98,3%
4. Medicinsk sekreterare 97,4%
5. Vårdadministratörer 97,4%
6. Barnsjuksköterska 97,3 %
7. Distriktsköterska 97,1 %
8. Hudterapeut 95,9%
9. Tandhygienist 95,7%
10. Förskollärare 95,7%

Så gott som alla kvinnodominerade yrken har med vård att göra. Det första kvinnodominerade yrket som inte har med vård eller utbildning att göra är

loko) kaj administroj pri salajro kaj dungitaro (90,2% kaj 25:a loko).

La vire plej dominataj profesioj

1. Teknikistoj pri malvarmigo kaj varmopumpilo 98,9%
2. Tegmentaj instalistoj 98,7%
3. Ladistoj pri konstruaĵoj kaj ventolado 98,7%
4. Lignolaboristoj, ĉarpentistoj 98,7%
5. Planktegajistoj 98,6%
6. Skafaldokonstruistoj 98,4%
7. Ladistoj 98,3%
8. Fiŝkaptistoj 98,3%
9. Masonisto 98,2%
10. Betonlaboristoj 98,1%

El tio mi konkludas, ke viroj venis pli fronten por eniri tradicie inajn profesiojn ol virinoj en virajn profesiojn.

La sekvaj profesioj estas la plej "egalaj" kun 50% (49,6%–50,4%) de ambaŭ seksoj:

- Kuiristoj kaj bufedistinoj (mi tamen metas demandosignon pri kunfandado de la du profesioj en unu en la statistiko)
- Operaciaj manaĝeroj ene de komunumservoj
- Sportaj trejnistoj kaj instruistoj
- Labormedio-inĝenieroj, laboraj kaj mediaj higienistoj
- Asekurvendistoj kaj asekuraj konsilistoj
- Frajtotransportistoj kaj transport-makleristoj

Kiajn konkludojn oni povas eltiri el tio? scivolas Roger

bistandsbedömare (90,5% kvinnor och på 23:e plats) och löne-och personaladministratörer (90,2% och 25:e plats).

Mest mansdominerade yrken

1. Kyl- och värmepumpstekniker 98,9%
2. Takmontörer 98,7%
3. Byggnads- och ventilationsplåtläggare 98,7%
4. Träarbetare, snickare 98,7%
5. Golvläggare 98,6 %
6. Ställningsbyggare 98,4%
7. Tunnpåtslagare 98,3%
8. Fiskare 98,3%
9. Murare 98,2%
10. Betongarbetare 98,1%

Av detta drar jag slutsatsen att männen har kommit längre att komma in på traditionella kvinnliga yrken än kvinnor har gjort på manliga yrken.

Följande yrken är mest "jämlika" med 50% (49,6%–50,4%) av båda könen:

- Kockar och kallskänkor (jag sätter dock ett frågetecken att slå ihop de båda yrkena till ett i statistiken)
- Verksamhetschefer inom samhällsservice
- Idrottstränare och instruktörer
- Arbetsmiljöingenjörer, yrkes- och miljöhygieniker
- Försäkringssäljare och försäkringsrådgivare
- Speditörer och transportmäklare

Vilka slutsatser kan man dra av detta? undrar Roger



Rödspov på Öland – Nigravosta limozo sur Oelando

de Renate Säfström



Isande kall vind, strålande sol och
rödspoven har funnit sin sten.

Våren har också kommit till Öland.

Frosta malvarma vento, brila suno kaj
la nigrvosta limozo trovis sian rokon.

La printempo venis ankaŭ al Oelando.



La jarraporto de Amnestio Internacia: Grava kritiko al Maroko

Amnestys årsrapport: Hård kritik mot Marocko

de/av Lena Thunberg en 2023-04-17



La pacprotektita taĉmento Minurso de UN en Okcidenta Saharo estas surloke en Okcidenta Saharo ekde 1991 por realigi referendumon pri la sendependeco de Okcidenta Saharo.

En sia jarraporto por 2022, Amnestio Internacia skribas, ke ĉe la aŭtuna plilongigo de la mandato de Minurso, ankoraŭ ne ekzistas HR-mandato (HR = Homaj Rajtoj), tio estas, la rajto kaj devo por la UN- taĉmento raporti pri malobservoj de homaj rajtoj.

Neniu homaj-rajtoj-organizoj estas allasitaj al la Maroko-okupata Okcidenta Saharo.

La marokaj aŭtoritatoj subpremas la pacan protestojn de okcidentaj saharanoj per pli granda forto ol antaŭe. Aktivuloj kaj sep ĵurnalistoj estis malliberigitaj.

En marto kaj aprilo, maroka polico submetis 12 okcidentajn saharajn virinojn al parola kaj seksa perforto. La okcidentaj saharaj virinoj esprimis sian solidarecon kun la Okcidenta Sahara aktivulino Sultana Khaya kiu estas sub hejmaresto dum du jaroj.

En majo 2022, Sultana Khaya vojaĝis al Hispanio por ricevi terapion por la vundoj pro kiuj ŝi suferis dum la dujara hejmaresto pro atakoj de maroka polico. Neniu oficiala esploro pri la seksperforto kaj aliaj krimoj kontraŭ ŝi kaj ŝia familio estas farita.

FN:s fredsbevarande styrka Minurso i Västsahara finns på plats i Västsahara sedan 1991 för att genomföra en folkomröstning om Västsaharas självständighet.

I sin årsrapport för 2022 skriver Amnesty International att vid höstens förlängning av Minurso:s mandat finns ännu inget MR-mandat (MR = Mänskliga Rättigheter), det vill säga rätt och skyldighet för FN-styrkan att rapportera om brott om de mänskliga rättigheterna.

Inga organisationer för mänskliga rättigheter får tillträde till det Marocko-ockuperade Västsahara.

De marockanska myndigheterna slår ned västsahariernas fredliga protester med större kraft än tidigare. Aktivister och 7 journalister har fängslats.

I mars och april utsatte marockansk polis 12 västsahariska kvinnor för verbalt och sexuellt våld. De västsahariska kvinnorna uttryckte sin solidaritet med den västsahariska aktivisten Sultana Khaya som suttit i husarrest under två års tid.

I maj 2022 reste Sultana Khaya till Spanien för att få vård för de skador hon tillfogats under den två år långa husarresten med angrepp från marockansk polis. Ingen utredning om våldtäkt och andra brott mot de mänskliga

Torturo kaj mistraktado de okcidentaj saharanoj kaj ene kaj ekster malliberejoj daŭras. La raporto de Amnestio specife mencias Mohamed Lamine Haddi, kiu estas izolita ekde 2017 kaj apartenas al la tiel nomata grupo Gdeim Izik.

Amnestio ankaŭ raportas, ke la saĝtelefonoj de la defendanto de la okcidentsaharaj homaj rajtoj, Aminatou Haidar, kiu interalie ricevis la svedan premion Right Livelihood Award en 2019, estis infektitaj de la israela spionilo Pegasus.

rättigheterna mot henne och hennes familj har gjorts.

Tortyr och misshandel av västsaharier både i och utanför fängelser fortsätter. I Amnesty-rapporten nämns särskilt Mohamed Lamine Haddi, som suttit isolerad sedan 2017 och tillhör den så kallade Gdeim Izik-gruppen.

Amnesty rapporterar också om att den västsahariska människorättsförsvararen Aminatou Haidar, som bland annat fick det svenska priset Right Livelihood Award 2019, har fått sina mobiler infekterade av det israeliska spionverktyget Pegasus.

Kion oni rete diras pri Esperanto?

Inga Johansson informas



Mi de tempo al tempo eltondas diraĵojn de Twitter por ekscii, kion oni diras pri Esperanto. Foje estas pozitive, foje negative:



Vendredo, la 7-a de aprilo 2023:

Monda Tago pri Sano + Internacia Tago de Kastoro.

☆

Worse than Google translation actually. I would rather read Esperanto.

Pli malbona ol gugla traduko fakte. Mi preferus legi Esperanton.

☆

I've been learning Esperanto on and off for a few years and i like the language. Feels like a secret little club and it made it easier for me to learn other languages.

Mi lernas Esperanton sporade dum kelkaj jaroj kaj mi ŝatas la lingvon, sentiĝas kiel sekreta klubeto kaj ĝi faciligis al mi lerni aliajn lingvojn.

☆

Pluva tago hodiaŭ, sed niaj rododendroj jam floras!

☆

Is this Latin? Esperanto? Italian? Hmm. Is there a town that is linked to Esperanto in the UK?

Ĉu ĉi tio estas la latina? Esperanto? La itala? Hmm. Ĉu ekzistas urbo ligita al Esperanto en Britio?

☆

Finnlando ĵus fariĝis la 31-a membro de NATO kaj la silento de trans la landlimo en Rusio estas surda.

☆

La trankvila reago de Moskvo al Finnlando aliĝo al NATO mokas la klopodojn de Putin kulpigi la ukrainan invadon sur sekurecminaco de NATO.

☆

O esperanto também foi criado através de outras línguas, é uma língua a posteriori... Não foi criada do nada.

Esperanto ankaŭ estis kreita per aliaj lingvoj, ĝi estas aposteriora lingvo... Ĝi ne estis kreita el nenio.

Not even in Esperanto?

Eĉ ne en Esperanto?



We need esperanto 2.0

Ni bezonas esperanton 2.0



I'm drinking this esperanto tequila and it taste like apricot. I don't know what to believe anymore.

Mi trinkas ĉi tiun esperantan tekilon kaj ĝi gustas kiel abrikoto. Mi ne plu scias kion kredi.



Have you ever been to the Esperanto Museum in Vienna?

Ĉu vi iam estis en la Esperanto-Muzeo en Vieno?



Economists develop 'Market Esperanto,' a universal language to bridge the gap between global financial markets. Let's trade in harmony!

Ekonomikistoj evoluigas 'Merkatan Esperanton', universalan lingvon por limigi la interspacon inter tutmondaj financaj merkatoj. Ni komercu en harmonio!



I do think a global language would be nice I don't think it should be forced on anyone. Also make it not English please, make some cool Frankenstein language like Esperanto but less eurocentric.

Mi ja pensas, ke tutmonda lingvo estus agrable. Mi pensas, ke ĝi ne devus esti devigita al iu ajn. Ankaŭ bonvole ne faru ĝin kvazaŭ ia angla, faru ĝin iome mojosa Frankenstein-lingvo kiel Esperanto sed malpli eŭrocentra.

Nobelstipendium beslagtogs hos Pettson och Findus ryska översättare

Nätinlägg av **Kalle Kniivilä** i *Sydsvenskan* 2023-03-22



Aleksandra Polivanova

Bild: Daria Krotova, Memorial



Medan världen lyssnar på Kinas ledare angriper ryska myndigheter människorättsförsvarare och anklagar dem för att rättfärdiga nazism.

Klockan sju på tisdagsmorgonen knackade den ryska polisen på hemma hos Aleksandra Polivanovas mamma.

– Jag har inte bott där på tjugo år, men jag är folkbokförd där. Mamma berättade för dem, men de brydde sig inte, de gjorde husrannsakan ändå, berättar Aleksandra Polivanova.

Hon är chef för den förbjudna ryska människorättsorganisationen Memorials avdelning i Moskva, och snart hittade polisen även hem till henne.

– Här höll de på i fem timmar. De tog allt med ordet "Memorial", de grävde igenom alla papper. De tog alla datorer och telefoner. Och de tog det stora Nobeldiplomet som förvarades hos mig.

Memorial tilldelades Nobels fredspris förra året, och eftersom organisationen är ett nätverk av olika avdelningar tillverkade Nobelstiftelsen flera diplom och kopior av medaljen som skulle delas ut till olika lokalavdelningar, berättar Aleksandra Polivanova.

– De tog diplomet som en lokalavdelning skulle hämta hos mig, men de tog i alla fall inte kopian av medaljen.

Aleksandra Polivanova har översatt tre av Sven Nordqvists böcker om Pettson och Findus till ryska, och polisen hittade översättningsavtalet bland hennes papper. Då visade det sig att en av poliserna kände till böckerna.

– Det var så märkligt, den där ohyfsade, aggressiva antiextremistpolisen som precis hade hotat mig, plötsligt blev han så glad och började prata om vilka fina böcker det är. Och när han såg en barnkalender med Findus på köket så visade han den för sin kollega: "Kolla, det där är Findus!"

Sammanlagt var det nio medarbetare av Memorial som fick besök av polisen under tisdagen, när hela världens blickar riktade mot Kreml, där Vladimir Putin snart skulle ta emot sin kinesiska kollega Xi Jinping.

En av dem var Oleg Orlov, en av den förbjudna organisationens ledare. Han är nu misstänkt för spridande av falska uppgifter om den ryska försvarsmakten och förbjuden att lämna Moskva.

Grunden för anklagelsen är en text som Orlov publicerade på Facebook i november 2022, där han bland annat kallar den ryska regimen

för fascistisk och nämnde krigsförbrytelser de ryska väpnade styrkorna gjort sig skyldiga till.

För ett år sedan demonstrerade Oleg Orlov i centrala Moskva med en handskriven skylt: "Galningen Putin driver världen till kärnvaperkrig". För det brottet dömdes han till 50 000 rubel (motsvarande knappt 7 000 kronor) i böter. Som återfallsförbrytare riskerar han nu upp till 15 år i fängelse.

Polisen vände upp och ner på Memorials kontor i Moskva, beslagtog datorerna och drack upp vodka de hittade i lokalerna. Vad som därutöver beslagtogs är oklart, eftersom Memorials advokater inte tilläts närvara under husrannsakan.




Bild: Memorial.

Det är dock inte Orlovs text på Facebook som är den formella anledningen till husrannsakingarna. Den ryska myndigheterna utreder nu ett ärende där Memorial anses ha gjort sig skyldig till "rättfärdigande av nazismen" – en anklagelse som naturligtvis inte har någonting med verkligheten att göra.

Den passar däremot som hand i handske i det officiella ryska narrativet, där inte bara den ukrainska regeringen, utan även alla som motsätter sig det ryska anfällskriget i Ukraina,

ses som nazister eller nazisters hantlangare. Men de ryska brottsutredarna har fått gräva djupt i sina arkiv för att hitta ett lämpligt svepskäl.



Memorial, som tilldelades Nobels fredspris förra året, grundades under Gorbatsjovs perestrojka med det uttalade syftet att dokumentera Stalins förföljelser. Organisationen har samlat på sig ett enormt arkiv med uppgifter om miljontals sovjetmedborgare som oskyldigt fängslades eller dödades av regimen.

Under flera årtionden var Memorial den enskilt viktigaste människorättsorganisationen i Ryssland, men organisationen blev besvärlig för myndigheterna eftersom den även dokumenterade brott mot mänskliga rättigheter i nutid – och eftersom den ryska ledningen allt mer ville se Stalin som en stark ledare och glömma hans brott.

Redan för tio år sedan stämplades Memorial därför som "utländsk agent", vilket gjorde organisationens arbete betydligt svårare. Bland annat blev det i praktiken omöjligt för Memorials medarbetare att berätta om Stalins brott för skolbarn. I december 2021 förbjöds Memorial.

Under de årtionden som Memorial verkat har organisationen dokumenterat över tre miljoner offer för politisk förföljelse i Sovjetunionen. Uppgifterna i arkiven är ibland mycket detaljerade, men oftast ganska kortfattade.

De ryska myndigheterna hävdar nu att det bland de drygt tre miljoner namnen i Memorials förteckning över offer för förföljelse finns tre som kan vara kopplade till krigsförbrytelser. Bara i ett fall är detaljerna kända.

Det handlar om en man som 1954 dömdes för att ha tjänstgjort i den tyska ockupationspolisen under andra världskriget. Anledningen till att han finns i Memorials databas över politiskt förföljda är dock en annan: före kriget tvångsförflyttades han från sin hemby i Odessatrakten på grund av sitt tyska påbrå. När namnet fördes in i registret hade Memorial ingen kännedom om domen från 1954.

Dessa tre namn i Memorials databas är enligt de ryska myndigheterna tillräcklig anledning för att anklaga organisationen för "rättfärdigande av nazism", genomföra husrannsakan hos nio medarbetare samt vända upp och ner på Memorials två kontor i Moskva, varav ett redan beslagtogs av staten.

Aleksandra Polivanova är inte särskilt förvånad över att de ryska myndigheterna nu trappar upp försöken att stoppa Memorials verksamhet. Snarare är hon förvånad över att det sker först nu.

– När man förberedde det aggressiva kriget rensade man bort medborgarsamhället. Även Memorial likviderades som juridisk person redan några månader före kriget. Memorial passar ju överhuvudtaget inte i den officiella historieskrivningen, som även anfallet mot Ukraina grundar sig på.

Esperanta resumo: Pettson och Findus estas sveda infanlibro, tradukita al multaj lingvoj. Rusaj aŭtoritatoj brutale traserĉis la hejmon de la Moskva sekciestro Aleksandra Polivanova de la organizaĵo Memorials, organizaĵo pri homaj rajtoj kaj ricevinto de la pacpremio de Nobel. Ŝi ankaŭ estas la tradukisto rusen de tiu infanlibro. Oficiale la kialo de la atako estis suspektoj pri naziisma agado, sed la vera kialo estas reĝimkritika teksto en Fejsbuko de Oleg Orlov, alia sekciestro de la organizaĵo.

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

2023



Gunnar Olsson, Skövde, rekomendas ĉi tiun eventon. Li kutime partoprenas ĝin, kaj ankaŭ en 2023 li ĉeestis – sed nur unu tagon.

Jen teksto verkita de **Liba Gabaldo** pri la ĉi-jara kunveno:

La Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres" 25.2.2023 – 4.3.2023

MES estas printempa **unusemajna renkontiĝo de esperantistoj** en suda Francio en agrabla loko ĉe la Mediteranea maro. Tie ni loĝis en bela hotela restadejo Val d'Esguière, antaŭe palaco en la tridekaj jaroj, kaj nun nomata "Village Club Miléade". Hotelo kaj la parko estas bone prizorgataj, la personaro estas agrabla. Ĝi estis renovigita, aldoniĝis kelkaj novaj instalaĵoj, ekstera naĝejo, tenisejoj, "Spa"-centro por homa bonfarto (natura kosmetiko, masaĝoj, magnetismo, banoj).

Ĉi-foje kolektiĝis **90 partoprenantoj** el naŭ landoj por kune ĝui kursojn, diversajn prelegojn, posttagmezajn promenojn, ekskursajn vojaĝojn, vesperajn distraĵojn. Inter ni estis ukraina familio; patrino kun du

ĉarmaj geinfanoj, rifuĝintinoj gastantaj ĉe franca familio loĝanta en Parizo.

Ĉe la alveno, la nova hotelestro bonvenigis nin en la franca lingvo kaj bondeziris al ni agrablan restadon. Li ankaŭ prezentis al ni la ĉefprizorganton de la kuirejo kaj animantimon de la hotelaj aktivaĵoj. **Andreo Grossmann** brile tradukis lian paroladon.

Poste ni tostis per aperitivo, interkoniĝis kun novaj partoprenantoj kaj gaje **dancis farandolon**. Ĝi estas provenca ritma viveca ĉendanco, dum kiu la dancantoj manenmane serpentumas inter la publiko. Mi transdonis salutojn al la partoprenantoj de **Rosa Lopéz** kaj **Sol** kun **Francesc** kiuj ne povis ĉeesti la aranĝon. **Christine** prezentis la semajnan programon kaj la tri instruistinoj nelonge parolis pri instru-metodoj en siaj respektivaj kursoj.

Dum la tuta semajno okazis instruado de Esperanto en **tri kursniveloj**: la 1-a por

komencantaj parolantoj estis gvidata de **Zsófia Kóródy**, la 2-a por progresantoj gvidata de **Mireille Grosjean**, la 3-a pri literaturo gvidata de **Spomenka Štimec**.

Dimanĉon la 26-an de februaro okazis **kunveno de la ĝenerala asembleo de Esperanto-Provence**. Antaŭ la posttagmezaj kursoj, **Svitlana el Ukrainio** rakontis pri sia lando, konigis nin pri la historio, kulturo, folkloro, lingvo kaj pri aktualaj okazaĵoj en la nuntempe okupata lando.

Dimanĉe antaŭ la tagmanĝo ni fotiĝis por la **ĵurnalo Var-Matin**, en kiu poste estis aperigita artikolo pri nia staĝo, akompanata per la komuna foto.

Post la tagmanĝoj estis libera tempo por promenado en la naturo aŭ por partopreni **posttagmezajn ekskursojn al vizitindaj lokoj**. Estis proponataj **vizitoj al San Peire, lagetoj de Villepey, klostro en Fréjus, muzeo en Saint-Raphaël**. Interesaj estis la **vizitoj de abelejo en Esterel, de la muzeo de la fera Masko kaj de Reĝa Fortikaĵo en la insulo St. Marguerite**.

Ankaŭ la hotelo proponis aktivaĵojn en kiuj ni povis partopreni. Luj preferis kartludi, triki, prilabori broĉojn aŭ tutsimple babili. Carmen, per sia nekutima brodita vestaĵo, propagandis Esperanton per simplaj frazoj.

Dum la kafo-paŭzo eblis salteti super la longa turnanta ŝnuro aŭ rigardi foto-albumojn pri pasintaj renkontiĝoj en Les Issambres.

Vespere, kiel kutime, okazis diversaj prelegoj. La unuan vesperon **Mireille Grosjean prezentis diversajn stilojn de arkitektoj.** "Arto, lingvo – ĉu paraleloj eblas?"

En la lunda vespero ni spektis **filmon pri abeloj** kaj **Philippe Chavignon** rakontis pri bredado de abeloj pri kio li estas fakulo. La postan tagon ni vizitis liajn abelujojn en la naturo kaj povis aĉeti mielon.

Sekvantan vesperon **Spomenka Štimec parolis pri la ĉeĥa juddevena kaj denaska esperantista knabo Petr Ginz**, kiu famiĝis pri sia desegnaĵo de "La Tero vidata de sur la Luno", kiu aperis ankaŭ sur ĉeĥa poŝtmarko.

Merkrede, post la **vizito al Margarita insulo**, kiun la organizantoj donacis al ni senpage, **Hannes Larsson prezentis sian libron pri dulingva** (angla kaj franca) krimromano en kiu Esperanto ludas rolon por propagandi ĝin al la publiko.


Ĵaŭde vespere **Mireille kaj Spomenka parolis pri Hektor Hodler kaj pri lia patro, fama pentristo**.

Dum la lasta vespero okazis **loterio** en kiu ĉiu gajnis ion. La vespero estis dediĉita al **prezentadoj de**

diversaj kantoj, skeĉoj kiujn la partoprenantoj mem pretigis.

Aperis **plurlingva sceno de vulpo kaj korvo**, tri friponoj, fiŝvendisto, problemo kun lavmaŝino ktp. La plej amuza estis sceno pri ebrulo inspirata de la poemo de William Auld "Ebrio". Ĉe la fino prezentiĝis la **koruso de Bernard Bigonnet**. Sekvis dankoj al la organizintoj kaj al la instruistoj. Muziko de saksofonoj kaj akordionoj dancigis la partoprenantojn ĝis la noktomezo.

Sabate matene jam pluraj samideanoj adiaŭis nin kaj revenis al siaj hejmoj. Tamen daŭris la kurso de Spomenka, kaj en la apuda salono **Nina el Rusio prezentis al ni rusajn pentristojn: Vassily Kandinsky, Kasimir Maleviĉ, Marc Chagall kaj Konstantin Vasiliev**.



Jam la 15-an fojon la Esperanto-grupo de St. Rafael kaj Freĵus sub la gvido de Monique Prezioso kaj de Christine Graissaguel kun pliaj helpantoj organizis MES, laŭdire la lastan. Tamen estas espero, ke novaj organizantoj transprenos la taskon por daŭrigi la printempan tradicion de tiuj agrablaj semajnoj.

Dankon al ĉiuj kontribuintoj en la aranĝo, pri kiu ĉiuj estis kontentaj kaj strebis al la progreso de sia lingvonivelo. Ni ricevis multajn valorajn informojn pri Esperanto-kulturo. Speciala danko ricevu la tuta familio de Monique Prezioso, kiu multe helpis en la organizado kaj dum la aranĝo mem.

Prova en Esperanto-kurs

19–22 juni kl 10–15 i Equmeniakyrkan

I samarbete med Equmeniakyrkan i Gråbo och Studieförbundet Vuxenskolan i Göteborg anordnar Göteborgs Esperantoförening fyra dagars esperantokurser.

Läs mer på Göteborgs Esperantoförenings hemsida www.esperanto-gbg.org

Vi har tre språknivåer: nybörjare, mellangrupp och konversationsgrupp.

Vi lär oss ett par esperantosånger varje förmiddag. Vi nosar på esperantos historia och besöker kanske esperantobiblioteket i Stannum. Vi tipsar om fortsatta studier, reellt och på nätet. Vi tipsar om esperantoevenemang runt om i världen.

Kursavgift 400:–

Rabatt för deltagare från samma familj och för unga under 18 år.

Info och anmälan till siv.burell@gmail.com, helst via mail, men det går också att ringa 070-721 34 79.

Bonvenon al Esperanto-kurso en Gråbo en junio 2023!

För Göteborgs Esperantoförening
Siv Burell, vice ordförande




Nova lernolibro, eldonita de Folke Wedlin, Mölndal

Se vi – kiel mi – havas rilaton al la lago Vättern, vi certe ŝatos ĉi tiun libron – aŭ libreton, ĉar ĝi nur enhavas 38 paĝojn. Folke estas unu el la verkistoj de *EPoGo – Esperanto Por Gimnazianoj* – kaj ni atendis daŭrigon de tiu bonega lernolibro. Nun ĝi venis.

Nun ne temas pri Emma kaj Andreo, kiu de Marstrand veturis en Eŭropon, sed nun la urboj, la naturo, rakontoj kaj okazaĵoj ĉirkaŭ Vättern havas la ĉefan rolon. Do, *Dolĉega urbeto Grenna* estas memstara lernolibro por daŭrigantoj. Ankaŭ en konversaciaj grupoj ĝi estus inspira startpunkto por diskutoj.

Ĉiu ĉapitro, entute 18, komenciĝas per informo pri la aktuala objekto – urbo aŭ alie – kaj sekvas vortlisto. Poste oni traduku en Esperanton tekston pri la sama temo.



Ne ĉiam estas facile traduki ĉiutagajn svedajn esprimojn. Oni devas pensadi. Ekz. (paĝo 12:) Vi tar bilen oavsett, (paĝo 14:) Man har faktiskt haft esperantokurser där, det ni!, (paĝo 17:) Åh, dra åt skogen, (paĝo 20:) en dam med järnnypor, (paĝo 30:) Tändstickorna från USA kunde tändas endast mot ladans plan.

Tie li montras la gravecon de supersignoj (ĉi tie temas pri Ä kaj Å).

Ni uzos la libreton dum la somera kurso. Mi vere rekomendas la libron: interesa enhavo, belaj bildoj, mallongaj tekstoj, strikta strukturo – do, moderna lernolibro! /Siv

FIXERINGSBILD.



Indianer på buffeljagt — men hvar är buffeln?

Fiksbildoj el "Veckan" de 1904

Teksto sub la dekstra bildo:


Indianoj ĉasantaj bizonojn — sed kie estas la bizonoj?

Teksto sub la malsupra bildo:

Kion serĉas la maljuna viro?

**Jes, kion li serĉas? Mi ne povas trovi tion.
Ĉu vi? Sciigu al ni, se vi povas.**

/Andreas



Hvad søger den gamle mannen?